

2.100

La subtera perio de Budapeŝto estas la groto "Kadics Ottokár", sub la monto "Szemlőhegy". D-ro Hubert Kessler, geologo, esploris kun sia kamarado tiun groton en 1930. Oni scias de li, ke tiam la groto estis subtera "roz-gardeno" de kalcitaj kaj aragonitaj kristaloj. Nun tiu fabela mondo mirigas la vizitanton: en la lumo de reflektoroj fajreras la kristaloj, formante blankajn rozojn, cirusojn kaj burĝonbrasikon. El la 2-km galerioj eblas viziti 400 m, sed oni daŭre laboras por plifaciligi la viziton al pli granda parto.
Inĝ. Peter Vukov, grot-esploristo

La venonta numero
1 (1708)
aperos la
20-an de januaro

Pri la venontjara kongresurbo

Budapeŝto — la ĉefurbo de la grotoj

Ne ekzistas alia ĉefurbo, sub kiu troviĝus kilometroj da grotoj. La mirinda panoramo de Budapeŝto altiras grandajn amasojn da turistoj, sed malmultaj scias, ke la profundaj grotoj de Buda-Montaro proponas juvelojn al la vizitanto.

Sur la areo de la urbo antaŭ 200 milionoj da jaroj ondis "Thetys"-maro, kaj apenaŭ antaŭ 60 milionoj da jaroj Eocena maro postlasis dikajn tavolojn de kalko-ŝtono kaj dolomito. En la pliocena epoko sekiĝis la tuta Karpat-baseno, ĝi travivis movriĉan epokon, la montoj estiĝis kaj foriĝis.

La Buda-flanko leviĝis kaj la Peŝta malleviĝis en profundaĵon de mil metroj dum granda geologia katastrofo. El la profundaĵo impetis termakvoj en la tektonikajn fendegojn, kiuj koroziis kaj dilatis ilin. La termakvo sekvis la genezon de Danubo-valo, kaj dum miljaroj kreiĝis la grotoj. Hodiaŭ oni jam konas ĉi-loke pli ol 25 km da groto-koridoroj. La plej granda estas "Mátyáshegyi", vizitebla nur al speleo-

logoj. Ĝi estas 5 km longa labirinto sen stalaktitoj kaj stalagmitoj.

200 m sude de tiu groto, en 1904, oni komencis esplori la groton "Pál-völgy" (Paŭlo-valon), kaj en 1927 ĝi estis malfermita por turistoj: ĝi estas ekipita per betonaj trotuaroj, ŝtuparoj kaj elektraj lampoj. En 1980 oni malkovris novajn galeriojn, kaj hodiaŭ la groto havas longon pli ol 3 km, el kiu eblas viziti 400 m. Galerioj de la groto ebligas bonege studi la agadon de la pratemaj termakvoj, kaj tiun de la tektonikaj efikoj. Sur la muroj de kelkaj galerioj troviĝas belaj kristaloj el kalcito, fosiliaj konkoj, stalagmitoj kaj stalaktitoj. La plej granda groto "Teatro-ĉambrego" havas tiel bonan akustikon, ke oni povas bonege aŭskulti klasikan koncerton pere de magnetofono.

"Heroldo" de Esperanto

1982 XII. 28

405